## *Serĉenigmo*

*En la destra bildo troviĝas dek diferencoj al la maldestra.*
*Trovu ilin!*




*Vi ankaŭ povas kopii la bildonj al ekstra paĝo por pligrandigi ilin. Tiel vi eble pli bone ekkonos la diferencojn.*

***solvoj de la maja numero*** .
1. alo, 2. balo 3. abelo 4. baleno 5. aleno 6. lano 7. ano 8. rano 9. Irano 10. rikano 11. ankro 12. rano 13. aro 14. rako 15. karto 16. raketo 17. kreto 18. reto 19. ero

☺

Kontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +49 3831 490003

**Stralsundaj frekvencoj**

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

**jaro 2007** **julio**

## La sunradio

La tago ŝajnas esti griza,
sed tamen tra la nuboj venas lum',
kaj sunradio brilas tre surpriza
sur via vojo tra nebula fum'.

Ĉe via vojo ree buntas floroj
kaj birdoj trilas bele en arbar'.
Vi povas ĝui de la florkoloroj
kaj de odoroj de la foliar'.

La tuta mondo ree ŝajnas hela,
malgaja sent' rapide flugas for,
ne restas plu en vi malĝoj' kruela,
sed ĝojo ree regas en la kor'

Malte Markheden

Ĝuu la someron en etoso de iu ajn Esperanto-renkontiĝo ! La longan vojon al Jokohamo vi eble ne iros. Sed okazos sufiĉe da aliaj.



## Ni funebras

**pro la forpaso de nia klubano kaj longjara esperantisto**

***Ernst Lutzke***

**Pro sia grava malsano li dum la lastaj jaroj ne plu aktive povis partopreni nian klubvivon. Tamen li estis preta esti membro de la arbitracia komisiono en nia landa asocio kaj ĝis la fino li private okupiĝis pri Esperanto.**

**Ni honore tenos lian personon en nia memoro.**

**Al lia vitvino, Erika, kaj al lia filino ni esprimas nian sinceran kondolencon.**

## Pentekosto en Hamburgo

Jam tradicie okazis la kongreso de la germanaj esperantistoj dum la pentekosto-festo kaj ni povis konstati, ke la Hamburgaj samideanoj organizis eksterordinare eventoriĉan programon. Altkvalitaj prelegoj, interesaj ekskursoj kaj belegajn kulturajn kontribuojn ni povis ĝui.

Ĉu vi scias, kiel oni publike parolas aŭ kiun efikon biero havas je via sano. En Hamburgo vi povis ekscii tion. Sed ankaŭ interesaj informoj pri la situacio en la Eŭropa-Esperanto-Unio kaj la evoluo de grandaj kaj malgrandaj urboj en nuna Germanio estis prezentataj. Ankaŭ malgrandaj rondoj estis vizitindaj.

Nur tri tagoj - tamen unu kulmino post la alia sekvis dum la vesperoj. Maristoj-ĥoruso, la grupo Kajto kaj finfine Ralph Glomp enthuziasmigis la publikon.

En konata ŝlagro estas kantata, ke ĉiuj estas povruloj, kiuj ne konas la straton *Reeperbahn* dum nokto je duono antaŭ la unua h. Ni ne plu apartenas al tiuj.

Certe fariĝos malfacile atingi la saman nivelon je la venontaj kongresoj. Sed la novelektita estraro promesis tion.

## Denove en Mielno

Jam naŭfoje mi nun partoprenis ĈEP-on en Pollando ĉe la Balta bordo. Ĉifoje denove partoprenis pli ol 70 personoj el dek landoj. Mi devus ripeti min, se mi denove raportus pri la tiea eksterordinara etoso. Pro tio mi nur volas redoni la himnon al la ĝojo kun vortoj de Ludoviko Zamenhof laŭ la germana poeto Schiller. Ni kantis ĝin dum la lastaj du jaroj laŭ la melodio de la alia fama Ludoviko – Beethoven.

### Ĝojo

Ĝojo, bela Dia lumo,
vi, filino de l' ĉiel'.
Al vi venas nun adeptoj
por saluti kun fidel'.
:I Vi mirakle ligas kune
dividitojn de la sort'.
Fratoj estas ĉiuj homoj,
kiujn tuŝas via fort'. I:

Nia lingvo ESPERANTO
donas helpon al la mond'.
Ho kreskadu la anaro
de l' pacema nia rond'!
:I Kaj nuliĝu per kompreno
la malsato en la mond'!
Nia lingvo ESPERANTO
povas servi kiel pont'. I:

**La venonta renkontiĝo:**

Laŭ la lastfoja interkonsento en la Stralsunda urbodomo ni kunvenos je ĵaŭdo, la 10a de julio, 14:30h en la kafejo Strahl en la *Mönchstraße* de Stralsund; vid al vide de la marmuzeo.